

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 4 2008

Vendredon la 3an de oktobro

56a jaro

Kalendaro

(Kie? kiam? / Hvor? Når? – vd. ĉi-malsupre / se nedenfor)

Rezulte de la enketo – vd. p. 3 – ni ne plu kunvenos marde, sed nur LUNDE

Som følge av vår spørreundersøkelse – se s. 3 – arrangerer vi klubbmøtene nå bare på MANDAGER.

LUNDON la 6an de oktobro (semajno / uke 41) – MANDag

SPECIALA KUNVENO por novuloj kaj komencantoj. Ni parolos kun ili per simpla Esperanto, por helpi ilin ekuzi la lingvon. Kaj se necese ankaŭ parte en la norvega, ekz-e klarigante kiel funkcias la movado kaj kiel Esperanto povos utili al ili.

SPESIELT MØTE for ny(begynner)e.
Vi vil delvis snakke norsk men også litt enkelt esperanto for å hjelpe dere i gang. Vi vil forklare om esperanto-bevegelsen og hvilken nytte du kan ha av å kunne esperanto – og ellers svare på de spørsmålene du måtte ha.

Lundon la 20an de oktobro (semajno / uke 43) – mandag

Bjørn K Øyen: Vegetarismo – kulturaj / religiaj, ekologiaj kaj (spirit)sciencaj aspektoj / motivoj. Kun gustumaĵoj!

Bjørn K Øyen: Vegetarisme – kulturelle/ religiøse, økologiske og (ånds-) vitenskapelige aspekter / motiver; med smaksprøver!

LUNDON la 3an de novembro (semajno / uke 45) – MANDag

"Kuk(et)oj de mia infanaĝo – kaj de tiu de mia avino". Heming W. Thorbjørnsen prezentos tradiciajn kukojn kaj kuketojn de sia regiono (norda Rogaland), kun gustumaĵoj por ĉiuj; ankaŭ receptoj por tiuj kiuj volos mem provi baki.

"Min barndoms kaker – og fra min bestemors barndom." Heming W. Thorbjørnsen viser fram tradisjonelle kaker fra hjemmedistriktet sitt (Nord-Rogaland), med smakebiter for alle; også oppskrifter for dem som vil prøve å bake selv.

Daŭrigo sur p.2

Forts. neste side →

Lundon la 17an de novembro (semajno / uke 47) – mandag

Multaj gejunuloj havigas al si bazajn sciojn pri Esperanto per la kursoj kaj ekzercoj ĉe www.lernu.net. Sed ĉi-somere por la unua fojo la lernu-anoj povis renkontiĝi vizaĝ-al-vizaĝe. Geir Langård partoprenis en tiu aranĝo en Slovakio. Por diskuto: Kiun rolon tiaj kaj aliaj kunvenoj povos ludi en nia nova komputilema mondo?

Mange unge mennesker skaffer seg grunnkunnskaper i esperanto ved kursene og oppgavene på www.lernu.net. Men i sommer for første gang kunne de møtes ansikt til ansikt. Geir Langård deltok i dette arrangementet i Slovakia. Til diskusjon: Hvilken rolle kan slike møter spille i vår nye datapregede verden?

LUNDON la 1an de decembro (semajno / uke 49) – MANDag

Eksterlandaj kaj internaciaj periodaĵoj en Esperanto. En *Norvega Esperantisto* ni ĉiujare koncize prezentas abonindajn revuojn. Ĉi-kunvene ni studos kaj diskutos ilin pli detale. Ĉu vi volas prezenti unu kiun vi konas?

Utenlandske og internasjonale tidskrifter. I medlemsbladet Norvega Esperantisto omtaler vi kort hvert år noen som det er verdt å abonnere på. På dette møtet ser vi nærmere på dem. Vil du fortelle om et blad som du kjenner?

Lundon la 15an de decembro (semajno / uke 51) – mandag

La Zamenhofa tago kaj la Tago de la Libro. Kunportu E-libron kun vi ŝatas, prezentu ĝin kaj voĉlegu el ĝi!

Zamenhofs 149-års dag. Tradisjonelt også Bokens Dag. Ta med og presentér en esperanto-bok du har (hatt) glede av.

Postpaŭze, ĉiukunvene: Lingvaj demandoj. (Kunportu la viajn!)

Språkspørsmål etter pausen på hvert møte. Ta med dine!

Ni komencas je la 19a horo.

Kunvenejo: Olaf Schous vei 18 (enirejo Schouterrassen), 0572 Oslo. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj iru supren laŭ Båhusveien – aŭ malsupren de Sinsen T (buso, metroo) / Sinsenterrassen (tramo).

Nå er møterommet pusset opp og klart til utleie.

***VET DU om en annen for-
ening som kunne være
interessert i å leie noen
kvelder eller en helg?***

Jen la rezulto de la enketo / spørreundersøkelsen

Venis 11 respondoj / svar el 77

– ĉiuj de viroj / alle fra menn (!)
sub 30 jaroj: 4
inter 31 kaj 50: 4
inter 51 kaj 70: 2
kaj 1 pli ol 70 jaroj

– 3 ege/ svært aktivaj, 1 aktiva, 7
ne aktivaj

Por tiuj, kiuj regule venadas al la
kunvenoj, kalkulas po 3 voĉoj.
Junuloj sub 30 jaroj po 2 voĉoj.
Ĉiuj aliaj havis po 1 voĉo.

*De som kommer regelmessig til
møtene fikk 3 stemmer. Ungdom
under 30 år fikk 2. Andre 1.*

Ĉu ni ŝanĝu?

nepre / absolutt: 4
bona ideo / god idé: 10
kontraŭ / mot: 2

Kiu tago konvenas? Hvilken dag passer?

Lundo / mandag: 6 poentoj
Mardo / tirsdag: 5
Merkredo / onsdag: 2
Ĵaŭdo / torsdag: 1
Vendredo / fredag: 1
Sabato dumtage / lørdag på dagtid: 1
Dimanĉo dumtage / søndag dagtid: 1
Ĉiuj same bonaj / alle like gode: 5
Ne scias / vet ikke: 2

Kiom ofte? Hvor ofte?

ĉiusemajne / hver uke: 1
ĉiun duan semajnon / annenhver: 2
dufoje monate / 2 ganger i
 måned: 2 (ne alternativo, sed
 2 skribis kiel komenton tion)
ĉiun trian semajnon / hver tredje: 4
malpli ol unufoje monate / sjeld-
 nere enn én gang i måneden: 5
ne scias / vet ikke : 4

EL TIO la estraro konkludis (1) ke estas plimulto por ŝanĝo, (2) ke la preferata ofteco estas ĉiun 2an aŭ 3an semajnon, do ni decidis 2 fojojn monate, kiel antaŭe, kaj (3) ke la plej populara tago estas lundo (sed ke la diferenco inter lundo kaj mardo estas malgranda).

Av dette konstaterer styret (1) at det er flertall for endring, (2) at de fleste foretrekker møter hver annen eller tredje uke – følgelig bestemte vi to ganger i måneder, som før – og (3) at den mest populære dagen er mandag (men at forskjellen mellom mandag og tirsdag er liten)

Do ni faris moderan reformon. Kaj ni pretas modifi la sistemon novjare, se ekzemple iuj neniam povas veni lunde (tiukaze, bv. mesaĝi!)

Da har vi foretatt en moderat reform. Og vi er villige til å justere systemet over nyttår. Er det f.eks. noen som aldri kan komme på mandager?

OKAZIS

Mardon la 2an de septembro

Kjell Peder Hoff kaj Snorre Benum rakontis pri siaj diversaj travivaĵoj en la UK en Roterdamo kaj montris al ni la Kongresan Libron, la prelegojn de la Kongresa Universitato kaj aliajn librojn kaj informilojn pri diversaj E-aktivadoj, kiujn ili akiris tie. Kjell Peder tranoktis en la amasloĝejo, kaj per tio ne nur ŝparis hotelmonon, sed ankaŭ facile kontaktiĝis kun pluraj famkonataj movadanoj kiuj same loĝis tie. Partoprenis nur 14 norvegoj, multe malpli ol el la aliaj nordiaj landoj, kaj Snorre kalkulis, ke por ke la loĝantaro de Norvegio estu samproporcie reprezentata kiel Islando, devus esti 139 NELanoj en la UK!

La postan interparolon riĉigis partopreno de gasto el Kaunas, Adas Vadminas el Kaunas.

Raportis Douglas

Lundon la 15an de septembro

Heming raportis pri sia partopreno en IJK (junulara kongreso). Li klarigis pri la diversaj kategorioj de TEJO-komitatanoj (li mem elektiĝis C), kaj pri la tradicioj, kiel la "anĝeloj" kiuj helpas la novulojn.

Ĉi-jare li kaj la aliaj «maljunaj» estraranoj devis transdoni la spertojn al la nova generacio. Ĉar ili estas 16/19-jaraj, tio estas tre grava tasko.

Al demando pri la lingva nivelo Heming respondis ke la kongresanoj uzis Esperanton pli kiel rimedon por interkompreno ol kiel lingvon indan provi praktiki senerare.

IJK estas malfermita al ĉiuj, sed organizita de junuloj por junuloj, do oni ne devas plendi pri bruo ĉar «IJK = bruo»!

Poste Raymond Johansen norvege donis siajn impresojn kiel komencanto – li povis konstati ke ĉiuj akceptis lin afable kaj helpeme.

Plejparte laŭ raporto de Nicolas

Globaliseringskonferansen /La konferenco pri tutmondiĝo 6 – 9 novembro (semajno 45), *Folkets Hus*.

Jen grandioza aranĝo, kun 5 grandaj kunvenoj kaj pli ol 80 seminarioj kun famkonataj prelegantoj el Norvegio kaj eksterlando. NEL anas en la Norvega Socia Forumo, kiu aranĝas la konferencon. Ni starigos info-budon pri Esperanto.

Et storstilt opplegg, med 5 stormøter og over 80 seminarer med politikere, fagfolk og forfattere fra inn- og utland. Info-bod om esperanto: Der trenger vi litt hjelp.

Nia libro-ekspozicieto staros ekde lundo en la Deichman-filio de Røa kaj restos tie dum la tuta oktobro. Post tio vi povos mendi ĝin por **via** loka biblioteko.

Tlf. 22 35 08 94

www.esperanto.no/oslo

Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)

Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper